



ESPERANTISTA

REVUO POR ESPERANTO EN ĈEĤOSLOVAKIO

Eldonas Esperanto-Asocio en ĈSR, Praha XIX/7 - 7075. — Redaktas Dr Stanislav Kamarýt.

Esperantské léto

Počátkem srpna sešlo se na světovém kongresu esperantistů v Bournemouth na 1600 účastníků. Téměř současně konal se sjezd Beznárodního esperantského svazu v Paříži, jehož se účastnil skoro týž počet členů SAT. Při obou kongresech byly letní esperantské university. U nás byly v červenci a v srpnu letní dvojtýdenní kurzy esperanta v Karl. Varech, Doksech a v Rožnově pod Radh., z nich kurzy v Doksech měly 250 účastníků, jež učilo 11 učitelů. Podobné kurzy byly v červenci a v srpnu ve Francii (Angoulême, Granville), v Dánsku (Helsingør), Norsku (Lofthus), Finsku. Ty, které se konaly současně s Doksy, vyměnily si s naší koleji pozdravné dopisy. Ve Versailles se sešla výroční schůze esperantské mládeže od 3. do 10. srpna. Ve Švédsku konal se ve Viskaldalen počátkem července esp. kurs o konstitučních problémech, družstevní organizaci, škol. otázkách, starobním pojištění a starob. důchodech, uspořádaný švédským odborovým ústředím pro členy odborových organizací z různých zemí; účastnili se Bulhaři, Angličané, Holanďané, Němci, Francouzi, Poláci, Norové, Turci, Švédové, Američané; mezinárodní účast byla podmínkou pro uspořádání kursu, velké procento účastníků dostalo na cestu úhradu od veřejnoprávních nebo odborářských švédských organizací. — Kongres rakouských esperantistů v červenci ve Štýrském Hradci soustředil na tý-

den několik set esperantistů rakouských. V Dánsku v Kerk-Avezaath byla 28. VII.—4. VIII. stočlenná prázdninová osada velmi mezinárodní. — Připojme k tomu, že po našem sjezdu v Liberci, kde se sešlo přes 700 účastníků, přišlo na konci července na sjezd slovenských esperantistů do Bratislavy asi 300 lidí, z nich zase mnoho Čechů. A skončeme konstatováním, že na přípravné kurzy esperanta před sjezdem v Bournemouthu přihlásilo se najednou 800 účastníků a že mezi účastníky světového sjezdu demokratické mládeže v Budapešti odhaduje se počet přítomných esperantistů na tisíc.

Takový cílý život panuje mezi esperantisty v horkém létě 1949. Před roky v létě hnutí spalo čekajíc na podzimní sezónu, jak správně konstatoval ve Verda Voĉo de Doksy Dr Pitlík. Jsou to fakta a čísla, jež jsou mimořádně přesvědčivým dokladem o životnosti našeho úsilí. Nelze si představit, jak by bylo lze užívání esperanta zastaviti nebo jak by bylo lze místo esperanta zaváděti jiný umělý jazyk nebo nějak pozmeněné esperanto. To, co si naši bojovníci prvního sledu přáli, je skutečností. Esperanta se užívá jako přirozeného jazyka k nejrozmanitějším cílům. A navíc ještě: je mezi esperantisty velká většina těch, kdo se snaží, aby esperanto bylo jedním z nástrojů pro nastolení míru mezi národy.

S. K.

Nia kongreso en Bournemouth

La invitantoj al la 34-a Universala Kongreso de Esperanto en Bournemouth estis pravaj priskribante la kongresurbon kiel lokon allogan laŭ ĉiuj manieroj. Bournemouth, kun sia vasta kaj brila marbordo, kun sia abunda verdo de ĝardenoj kaj publikaj parkoj, kun siaj hotelaj palacoj kaj kun siaj multaj ejoj por distro kaj amuzo, estas vera juvelo inter la lokoj, kiuj ĝis nun gastigis niajn kongresojn. En Bournemouth oni povis ĝui la vivon kaj por ni estis interese observi, kiel la cetere aferemaj angloj scipovas tion fari.

La partoprenantoj de la Kongreso kreis sian propran mondon en tiu ĉarma urbo. Ĝiaj belaj parkoj estis de esperantistoj ĉiam nur trakurataj, la luksaj hoteloj uzataj por mallonga dormo kaj kiun tro allogis la maro, devis bani sin en ĝi frue en la mateno, se li deziris ne manki en la kongresaj aranĝoj.

Spaco ne permesos citi ĉi tie la programon, pri kies detaloj ni legos en niaj grandaj revuoj. Sufiĉu kelkaj personaj rimarkoj pri tiuj faktoj, kiuj speciale vekis nian atenton.

La kongreso estis granda kaj vere internacia, sed oni ĝenerale bedaŭris foreston de kelkaj nacioj, kies tro severaj reguloj ne permesis alvenon. Tiel mankis en la bukedo de ĉeestantaj nacioj tute bulgaroj, rumanoj, hungaroj, grekoj, italoj, portugaloj. Eminentaj reprezentantino de polaj samideanoj estis sinjorino Wanda Zamenhof, bofilino de la Majstro. La elokventa dro Lapenna el Zagreb parolis sola, sed brile en nomo de esperantistoj jugoslavaj. La subskribinto tamen nepre ne konsideris sin sufiĉa reprezentanto de la granda ĉeĥoslovaka movado esperantista. Li atingis Anglujon lunde, sed nur tri tagojn post li alflugis post venko de ĉiuj malfacilaĵoj prezidanto de

EAĈSR Malik. Prokrastite, sed tamen al plena kongresejo ili povis transdoni ĉeĥoslovakajn salutojn, Malik en nomo de ministerio de informoj, kies li estis oficiala delegito, Ginz por EAĈSR kaj por esperantistoj de nia lando. Sajne kun entuziasmo kaj ĝojo estis akceptitaj niaj mallongaj alparoloj, pruvantaj, ke ne ekzistas kurteno de iu ajn speco inter nia lando kaj la cetera mondo.

Por ni estis apero natura, sed por neesperantistoj preskaŭ mirakla, ke jen egipta samideano Tados Migalli interparolis flue kun ĉina amiko Cun-Cun-Je, jen amaso da francaj samideanoj vikle babilis en societo de islandanoj, jen brazila samideano amuziĝis inter nederlandaj kaj finnaj. Multajn el ili ni invitis al Ĉeĥoslovakio kaj ni forte esperas, ke ni povos denove premi iliajn meritojn.

Sukcesoj al multaj kongresaj aranĝoj ebligis la kongresanojn mem, alportante al ili atenton kaj viglon, iam ankaŭ la necesan bonhumoron. Per tio ni nepre ne volas nei meritojn de la aranĝantoj, kiuj plejparte montris sin tre lertaj. Nur kiu mem spertis, povas juĝi kiom da klopodoj kostis la preparoj. Konsentante, ke plaĉoj estas diversaj, ni kuraĝas tamen esprimi nian opinion, ke eble troa estis la zorgo, ke ĉiu kongresano vidu la varietecon. Tri vesperoj estis dediĉitaj al tiu aranĝo. La seriozuloj, kiuj „maltraŭ pli bona intenco“ ĉeestis tiun vesperon, apenaŭ bedaŭris. Ĝia stelo, la delikata angla belulino Rayonne, kapablis sorĉi laŭ plej nekomprenebla maniero. Surprize kaj plej agrable estis por ni, ke ŝi sciis legi niajn pensojn en ĉarma Esperanto kun dolĉa angla akcento.

Bonan Esperanton, kiu restis bona kaj agrable por aŭskulto, eĉ se estis rimarkebla angla deveno de la parolanto, ni aŭdis dum oratora konkurso de junuloj mardo la 9-an de Aŭgusto, dum dua laborkunveno de UEA. La gainintoj forportis havindajn libropremiojn. Muziko por niaj oreloj estis la skota prononcado de nia lingvo, kian parolis ekzemple samideano Nicol el Hellensburgh.

Kiu serioze volis, povis tiri multan utilon el la kongresaj kunvenoj. Precipe instiga estis la vendreda diskuto pri la delegitaj servoj. Laŭ nia konvinko, apenaŭ iu alia maniero propaganda estas tiel efika, kiel montri de praktika utilo, kiun uzo de nia lingvo alportas. En nia lando ni vastege uzis tiun specon de propagando kaj sukceso ne

mankis. Tial ni havu densan reton de bonaj Delegitoj. Pri ilia elekto estis esprimitaj diversaj opinioj. Lujn ni povas klarigi per lokaj cirkonstancoj, kiuj en diversaj landoj estas malsamaj. Granda doloro de ni ĉeĥoslovakoj restas la neebleco aperi antaŭ la UEA-membraro en kvanto kaj kvalito respondanta nian signifon en la movado. Ĉar provizore ne estas haviĝebla permeso transdoni niajn kotizojn al centro de UEA, alportas lastjaraj Jarlibroj plorinde malriĉan nomaron de ĉeĥoslovakaj Delegitoj. Ni serĉas manieron, kiel kontaktigi UEA-anojn de la tutmondo kun nia lando, kie en preskaŭ mil lokoj atendas ilin servoretaj amikoj.


Granda merito de la organizintoj estis la fakto, ke ili sciis vekti atenton de la neesperantistoj por la Kongreso. Ne estis nura akto de ĝentileco, sed pruvo de vere amika sinteno, se la urbestro de Bournemouth kun sia pompa ora ĉeno aperis ripete inter ni, bonvenigis nin kaj adiaŭis per belaj, neformalaj vortoj kaj ĉeestis kun sia edzino la balon. La granda ĵurnalo Echo of Bournemouth regule per grandaj, ofte kelkkolonaj kaj ilustritaj artikoloj raportis pri la agado de la Kongreso kaj aldone reprints en ĉiu numero riĉan esperantlingvan rubrikon pri ĉiutagaĵoj.

Preletoj de la Somera Universitato havis sian altan nivelon. Multaj sincere bedaŭris, ke ne estis okazo aŭskulti d-ro'n Izák el Turĉ. Sv. Martin, kiu promesis paroli pri slovakaj stalaktitaj grotoj, sed kiu ne sukcesis alveni.

Ni dezirus havi ĉe ni la bonan filmon de Brita Esperanto-Asocio „Per aliaj vortoj“, kiun ni vidis en Bournemouth. Kvankam (aŭ pli ĝuste: ĉar) ĝi estis anglalingva, ĝi multe helpus nian propaĝandan laboron. Francan serton montris filmo pri venonta kongresurbo Parizo kaj la akompanaj vortoj de Warnier. Perlojn de tutmorda muziko ni aŭdis vendrede dum koncerto, direktata de Rudolf Schwarz.

Por ni, ĉeĥoslovakoj, estis la Kongreso valora okazo por kunveno kun aktivuloj diverslandaj kaj fintrako de aferoj de granda signifo por nia plua laboro. Tio estis la esperantista flanko de nia vizito. Krome ni uzis ĉiun okazon por informi niajn diverslandajn amikojn pri nia patrujo, pri la grandaj ŝanĝoj en ĝi okazantaj kaj pri la nova vojo, kiun ekiris nia respubliko. O. Ginz,

Vlado Jukl



Ni skribas nekrologon de nia amiko kun doloro profunda, kaj la malĝojo ne mildiĝis dum monatoj pasintaj post lia morto. Ni skribas pri viro ekstreme honesta kaj laborema, kies eksterordinaraj kvalitoj ne estis dum lia vivo sufiĉe emfazataj. Versimile al efektiva laborulo mankas tempo por mediti pri siaj meritoj.

Li naskiĝis la 12-an de Februaro 1892 en Mannheim, kie lia patro laboris tiutempe kiel inĝeniero. Li studis en Praha en liceo, kie li faris abiturientan ekzamenon en la jaro 1909, poste li frekventis abiturientan kurson en Komerca Akademio en Chrudim. Studis poste en Alta Teknika Lernejo en Praha komercajn sciencojn, en jaroj 1911 ĝis 1913 li laboris en Rusujo kiel komerca oficisto. En la j. 1914 li akiris diplomon pri profesora kapableco por Komercaj Akademioj. Dum la unua mondmilito li militservis, en 1919 fariĝis profesoro de Komercaj Akademioj kaj depost Oktobro 1919 li laboris ĝis sia morto, la 30-an de Aprilo 1949, en Komerca Akademio en Bratislava.

Li estis fakulo en pluraj sciencoj komercaj, precipe en korespondado fremdlingva kaj en stenografio. Li estis inter la unuaj, kiu jam en 1921 funde ellernis la novan stenografian sistemon Herout-Mikulík, komencis ĝin instrui en sia lernejo kaj fariĝis ĉefa kunlaboranto en ĝia adaptigo al slovakaj lingvoj. En la jaro 1939 li kompilis lernilon „Slovenský rýchlopis H—M“ (Slovaka stenografio H—M). En 1942 li ellaboris instruplanon por stenografio. Li estis kunaŭtoro (Mistrik—Jukl—Horvát) de „Obchodné písmo“ (Komerca literaro). En 1939 li fariĝis lektoro de stenografio en Slovaka Teknika Altlernejo kaj en Slovaka Alta Lernejo Komerca, en 1946 faka inspektoro de slovakaj komercaj lernejoj, 1947 prezidanto de Slovaka Stenografia Konsilantaro.

Funebras vidvino kaj du filoj, unu inĝeniero, dua doktoro de natursciencoj.

Li esperantistiĝis en 1908 kune kun Rudolf Hromada. La amikeco, naskiĝinta inter liceanoj, ligis ambaŭ virojn dum la tuta vivo. Jam en Rusujo Jukl kontaktis kun esperantistoj kaj estis funkciulo de E.-societoj en Kijev kaj Moskvo. Post la milito li seninterrompe partoprenis organizan vivon tre aktive. Li daŭre estis gvidanta komitatano de la Klubo en Bratislava kaj de la komitato

Asocia. Baldaŭ li komencis instrui Esperanton oficiale kiel nedevigan fakon en sia lernejo, kaj daŭrigis en tiu ĉi laboro preskaŭ seninterrompe dum la longa vico de siaj profesoraj jaroj. El liaj lernantoj estas inter aliaj fidela samideano Paŭlo Rosa. Inter la komitatoj de la klubo li estis unu el la plej laboremaj. Estas lia merito, ke Radio-stacio Bratislava en j. 1932 kaj 1933 dissendis kvar esperantajn horetojn. Ĝi estis tiutempe faro pionira. En sia lernejo li estis komisiita organizi ekskursojn de studentoj en fremdlandon. Li uzis por tio ofte servojn de esperantista organizo, precipe de ĈEA. En 1929 li redaktis siovakana broŝuron (48-paĝan) pri tiuj ekskursoj dum la unua jardeko de la Respubliko. Estas edifanta sperto foliumi ĝin. Jukl gvidis en 1925 ekskurson al Nigra Maro (Koŝice — Halmei — Bukureŝt — Konstanca — Bospor — Konstantinoplo — Varna — Orechovica — Trnovo — Sofia — Beograd), en 1928 al Kanalo la Manche (Wien — Nürnberg — Mannheim — Ludwigshafen — Heidelberg — Kolonjo — Bruselo — Antverpeno — flandraj

urboj — nordfrancaj havenoj — Le Havre — Rouen — Parizo — Genevo). Ĉie estas aludoj pri helpo de esperantistoj, precipe en tiu dua ekskurso. Sed tie ĉi ni citas sole la du plej grandajn entreprenojn de tiu speco. Jukl preparadis planojn ankaŭ por aliaj ekskursoj kaj ĉiam li povis liveri bonajn servojn. Ankaŭ tio estis faroj pioniraj. Se estis bezone, li ankaŭ verkis. Bone. En Ĉeĥoslovaka Antologio estas liaj tre bonaj tradukaĵoj el slovakaj aŭtoroj.

Jen faktoj. Sed ili diras preskaŭ nenion. Ili ne povas rakonti pri karaktero de la forpasinta viro. Li estis homo ne sole laborema sed samtempe ekstreme komplezema al ĉiu. Li servis ne sole al siaj studentoj kaj al Esperanto, sed al ĉio kaj ĉie, kie helpo estis bezona, kie estis necese batali por bona afero, kie necesis streĉi fortojn en laboroj pioniraj kaj idealismaj, el kiuj ne estis promesata profito materia.

Forpasis idealisto praktika, modelo de esperantista idealismo. Ankaŭ amiko la plej fidela. (Kamarýt)

KRONIKO ENLANDA

Ekzamena Komisiono kunsidos en Praha la 12-an de Novembro. En Decembro aŭ Januaro la komisiono kunsidos en Brno. La kandidatoj aranĝu laŭ tio siajn aliĝojn.

Dua volumo de Biblioteko, eldonata de Instituto de Esperanto-Servo, aperis. Ĝi estas *Lerneja Reformo de Ĉeĥoslovakio*, tradukita de Jar. Mařík. En same plaĉa aranĝo kiel la Konstitucio. Ĝi estas ricevebla de la Instituto (Praha II, Malá Štěpánská 7) kontraŭ repago de la afranko. Mendu ĝin tuj kaj dissendu al viaj fremdlandaj amikoj! Ĝi ne estas destinita por kolektado aŭ por konservado en nia lando, sed por esti dissendata al la tuta mondo. Legu pri ĝi inter Ricevitaj libroj! Kiam ĝi estis disdonita al instruista kunveno en Bournemouth, ĝi signifis sensacion.

„Ĉeĥoslovakaj poŝtmarkoj por kolektantoj. Poŝtofiĉejo Praha I. Filatelista servo.“ Jen titolo de dupaga folio, eldonita de la Ĉeĥoslovaka poŝto kun bildoj de ĉeĥoslovakaj poŝtmarkoj kaj indikoj pri ilia prezo, koloro, valido kaj vendoprezo. La alineoj estas titolitaj: A Poŝtmarkoj por afranko, B Okazaj poŝtmarkoj, C Aeraj poŝtmarkoj, D Afrankŝuldaĵaj poŝtmarkoj, G Poŝtmarko por persona transdono, H Poŝtkartoj. Traduko estis farita de O. Ginz laŭ komisio de la poŝtministerio. La folio, kiu estas plua pruvo de agnosko pri uzebleco de nia lingvo fare de ĉs. poŝta administro, certe bone servos al esperantistaj filatelistoj. Ĝi estas ricevebla laŭ supre donita adreso.

Supera kurso de Esperanto en Karlovy Vary la 3-an ĝis 16-an de Julio, organizita de la Loka Klubo, havis 30 kursanojn. La kurso estis inaŭgurita dimanĉon en Baza faka lernejo en Rybáře la 3-an de Julio je la 10 horo de la kluba prezidanto MUDr Fr. Vaněk, kiu citis opinion de glora ĉeĥa muzikisto J. B. Förster, ke per muziko estas transdonataj ekskluzive noblaj sentoj de bonaj homoj. Simile ŝajnas al li, ke ankaŭ per Esperanto estas esprimitaj tendencoj kaj strebadoj noblaj kaj ke inter esperantistaro vivas kaj viglas ekskluzive bonaj karakteroj. Poste salutis la kurson kultur-referanto ĉe Regiona Nacia Komitato s-ro Michek, kiu akcentis nepran bezonon de pozitiva sinteno al novaj ideoj, reprezentataj per nia registaro. Dankante lin pro la salutvortoj Dr St. Kamarýt akcentis la altan patriotan kaj progreseman senton de ĉeĥoslovakaj esperantistoj, kiuj ĉiuj sentas kiel la plej altan devon moralan servi al sia patrujo. Sekvis detala ĉeĥlingva prelego de JUDr Tomáš Půmpř: Pri esprimado de verba aspekto en la ĉeĥa kaj en Esperanto, tre atente aŭskultita de ĉiuj kursanoj.

La 4—16-an de Julio estis ĉiutage prelegoj je la 9—12, se estis bezone ĝis la 13-a horo. Prelegis ĉefe Rudolf Hromada pri gramatikaj kaj stilaj problemoj, precipe kiel ili devas esti solvataj por tradukado, PhDr Stan. Kamarýt esperantlingve pri teorio de lingvo internacia kaj ĝia historio, MUDr Fr. Vaněk pri literaturo kaj ekzercado en vortprovizo. La prelegantoj sekvis la liston de temoj en la broŝuro de la Ekzamena Komisiono. La kursanoj vi-

zitadis akurate la lecionojn, sekvis tre atente la prelegojn, laboris konscience pri la hejmaj taskoj kaj ĉiuj vidigis en la fino rimarkindan progreson. Krom la programo alparolis la kurson ges-oj Rossetti el Anglio, vizitinte la urbon la 5-an de Julio, kaj regiona peranto F. Patera, kiu faris la 15-an de Julio tre interesan kaj tre atente aŭskultatan prelegon pri siaj spertoj en Malmö-kongreso.

La membroj de la Klubo, gvidataj precipe de A. Reček, faka instruisto, tre ofereme elserĉis malmultekostajn loĝejoj, plejofte en lernejoj, en kiujn ili devis brigadmaniere enporti litojn, kaj aranĝis kun direktorino de Charita samideanino Burešová komunan nutradon de kursanoj (maten-, tag- kaj vespermanĝoj). Tio ebligis la relative tre malaltan prezon por la kurso (1100 Kčs por du semajnoj en la mond-banloko dum kulminanta sezono). La klubanoj kaj s-ino Burešová meritas apartan dankon pro tiu ĉi sindonemo.

Posttagmeze kaj vespere la kursanoj partoprenis en la banloka vivo kaj ekskursis, gvidataj de urbaj samideanoj, en la ĉirkaŭaĵon. Dimanĉon la 10-an estis aŭtobusa ekskurso al Loket, Cheb, Františkovy Lázně, Mariánské Lázně. En Cheb la kursanoj vizitis la Klubon en ĝia klubejo sur la vidinda ĉefplaco, en Mariánské Lázně ili partoprenis la solenan kanto- kaj muzikkoncerton de 500 kantistoj el okcidentbohemiaj distriktoj. Kurŝina festo vendredon la 15-an de Julio en hotelo Národní dŭm kun improvizita programo muzika, teatra, kanta, gvidata de s-o Reček, havis eminentan nivelon kaj finis per entuziasma danco de ĉeestantaro ne grandnombra sed elektita.

Koncerto de orgena, voĉa kaj korda muziko en Karlovy Vary, aranĝita de la Esperantista Klubo okaze de la Supera kurso de Esperanto la 12-an de Julio je la 20,30 h. en la baroka dekana templo ĉe la ŝprucfonto, fariĝis grava okazintaĵo artisma. Al la koncerto estis invitita la publiko per afiŝetoj kun programo kaj per disaŭdigo en la kolonaro kaj en orgena nokturno. La vasta preĝejo estis plena jam unu horon antaŭ la komenco kaj je la komenĉo ĝi estis plenplena de la publiko, inter kiu ĉeestis multaj elstaraj gastoj de la banloko. Samideanino operkantistino Věra Borská kantis esperantlingve Largo el opero Kserkses de Händel kaj Lullikanton de Brahms, ĉeĥlingve el Bibliaj kantoj de Dvořák (Aŭdu ho Eternulo, Ĉe riveroj babilonaj), itale Caro mia Ben de Giordani kaj latine Ave Maria de Gounod. Akompanis ŝin orgene majstro prof. O. Čermák, kiu krome solludis orgene Toccata kaj Fuga d-mol de Bach kaj Preĝon el Notre Dame de Boelmann. Kuracista kvarteto el Karlovy Vary (A. Lepö, MUDr Jar. Vlček, MUDr Vl. Hoza, MUDr Frant. Vaněk) ludis Kvarteton Es-dur de Schubert, Adagion de J. Haydn, Ave verum de Mozart. Vira fiŝoro de Hlahol en Karlovy Vary kantis Preĝon de Smetana. La koncerto estis finita de prof. O. Čermák per brila orgena improvizo je temo de Sankta-Venceslaŝohoralo. La prezento de la programo estis same impona kiel la programo mem. La majstrecado de prof. Čermák, la agrabla kulturita potenco aldo de Věra Borská, muzika lerteco de la amatora kvarteto, kiu tre superis amatoran nivelon, entuzias-

mo de la virĥoro kune kreis atmosferon ravan. Mil koroj levigadis al ĉielo. Mil homoj sentis sin fratoj, ĉar muziko dolĉavoĉe kaj imperatively agordigis iliajn korojn. Kaj dank sento al Dio kaj al homoj same ŝvebis en la baroka preĝeja navo.

Somera Kolegio de Esperanto en Doksy la 16—30-an de Julio, okazinta tiun ĉi jaron jam la kvaran fojon, signifis pluan gradon en sia evoluo. Aliĝis 246 kursanoj, inter kiuj estas 2 svedoj (Abrahamson Wania, Johanson Inge), 1 nederlandanino (Jopie Hendriks), 1 bulgario (Dimitrov Todor). La Kolegio salutis perletere similajn kursarojn, samtempe okazantajn en aliaj landoj kaj ricevis ankaŭ de ili salutleterojn. Estis esprimita propono, ke tiaj someraj kursaroj interŝanĝu reciproke instruantojn kaj studentojn. Ni kredis, ke tiujara ĉeesto de 4 fremdlandaj esperantistoj signifas komencon de tiu ĉi ebleco.

La studentoj estis instruataj en du kursoj komenculaj (A1, A2, klasestroj K. Ŝolc kaj A. Slanina), en kiuj oni instruis laŭ la Ĉe-metodo, du kursoj progresintaj (B1, B2, klasestroj J. Vitek kaj Fr. Pytloun), kurso konversacia C (klasestro V. Ŝpŭr), seminario por kandidatoj de instruista ekzameno kaj esperantistaj funkciuloj D (klasestro J. Kožený), kurso por kandidatoj de kapableco por Ĉe-metoda instruado E (klasestro K. Ŝolc). Krom la nomitaj klasestroj instruis direktoro de la lernejo Dr Augustin Pitlik, Dr Stan. Kamarýt, Zdeněk Raška, Vl. Severa, Dr Fr. Vaněk, sume 11 instruantoj.

Krom la nomitaj 7 kursoj prilingvaj okazis ankoraŭ kurso oratora, gvidata de Ant. Slanina, kaj ciklo de prelegoj el esperantologio kaj esperantismo, en kiu prelegis Adolf Malík: Esperanto sur nova vojo (18.), K. Pič: Pri esperantaj neologismoj (25.), Dr. Stan. Kamarýt: Esperanto-movado en niaj landoj (26., 27.), Dr Aug. Pitlik: Fonetiko de Esperanto (28.), Dr. E. Sahliger: Esperanto kiel lingvo, Esperanto kaj laboristaro (27., 28.). Tiu ciklo estis destinita por D- kaj C-kursanoj kaj por gastoj kaj estis tre bone vizitata.

Interkonatiĝa vespero okazis la 16-an de Julio en halo de Distrikta Nacia Komitato. S-o V. Ŝpŭr bonvenigis la studentojn, direktoro de Kolegio dro A. Pitlik prezentis la instruantojn. Dimanĉon je la 9-a horo estis hisita Esperanto-Flago dum ludado de la Esperanto-himno. Direktoro dro Pitlik inaŭguris solene la Kolegion, kiun poste salutis en nomo de la Distrikta Nacia Komitato ĝia prezidanto V. Sedláček kaj en nomo de Loka Kleriga Konsilantaro lerneja direktoro V. Severa. Poste la klasestroj kontrolis ĉeestantajn studentojn en la klasejoj. Depost la lundo okazis regulaj lecionoj, ĉiutage je la 8—12 h., en klasejoj de la meza lernejo. E-kursanoj aŭskultadis en A-kursoj kaj akceptadis instrukciojn en apartaj lecionoj posttagmeze. Ankaŭ lecionoj de la oratora kurso okazadis posttagmeze laŭbezono en la lernejo aŭ en la subĉiela teatro. La vizito de studentoj estis daŭre tre akurata, neĉeestoj estis maloftaj. Ankaŭ hejmaj taskoj estis prilaborataj konsciencie kaj diligente. Lastan tagon, sabaton, estis prezentitaj al la studentoj ekzamentestoj, kaj ili ricevis konfirmon pri vizitado de la Kolegio kun klasifika noto.

La manko de loĝejoj kaŭzis, ke relative multaj kursanoj loĝis en komunaj loĝejoj, sed ne estis aŭditaj plendoj pri tio. Ankaŭ komuna nutrado en fabrikmanĝejo de firmao Delta kontentigis multajn kaj la direkto de la firmao akceptu kamaradajn dankojn pro la komplezo, kiun ĝi faris al la Kolegio per ebligado de tiu aranĝo.

Distraj kaj klerigaj entreprenoj por posttagmezoj kaj vesperoj, organizataj de s-o Ant. Slanina, kontentigadis ĉiujn same pro elekto de la programo kiel pro nivelo de la prezentado. Banado en la lago loĝis ĉiam multajn precipe dum bona vetero, kiu estis tiun ĉi jaron favora al la kolegio. Verda flago sur la strando vokis samideanojn al amika kunesto. Mallarĝaj filmoj, inter ili tiuj pri pasintaj kursoj, estis projekciataj de A. Slanina en la Subĉiela teatro la 18-an, prelego de s-o J. Vitek pri Laplando kun mallarĝaj filmoj, projekciataj de Slanina, okazis la 25-an, amikaj kunestoj kun improvizitaj programoj okazis la 19-an (je la 16-a h.) kaj la 20-an je la 20 h. en la gimnastikejo lerneja. Koncerto kun artisma programo en restoracio Zátíši la 26-an je la 20 h. kunvenigis ĉiujn kolegiatojn kaj ili tre aplaudis la programon, en kiu kantis operkantistino Věra Borská, akompanata plane de E. Urbanová, muzikis prof. Št. Urban je koncerta gitaro, B. Malíková je piano, kaj la „Verda

kvarteto“ (Mir. Tyrála, Ant. Sattek, Lad. Kavka, Dr Fr. Vaněk), dancis Eva Rašková, deklamis Miloš Nývlt, prof. J. Kožený, Dr Vaněk, J. Eisenreich kaj aliaj. Bivaka fajro okazis la 21-an, la programo daŭris ĝis noktomezo, oni multe ridis. En ĉiuj tiuj prezentadoj gvidis kaj anoncadis la programon Ant. Slanina, kiu scias altiri sur la scenejon ĉiun, pri kiu li supozas ian talenton aktoran aŭ prelegan, kaj li sukcesis mirinde. Ekskurso al kastelo Bezděz posttagmeze la 22-an partoprenis ankaŭ tre multaj, kaj la sekvintan dancadon en gastejo U Třešňáků ankaŭ. La ekskurso dimanĉa, la 24-an, en kvar autobusoj, al Česká Lípa, Děčín, Hřensko, tra „Ĉefa svisujo“ al Pravčická brána ne estos baldaŭ forgesita. Ni enskribu tie ĉi gvidinton de tiu ĉi impona ekskurso s-on J. Vitek.

La Venecia nokto sur Mächa-lago la 27-an estis travivaĵo rava. Multaj boatoj, sur ĉiuj ekskluzive esperantistoj, ridantaj, vokantaj, lumantaj per lampoj same kiel per sprito; la boatoj laŭ Slanina-komando ligiĝas kaj faras gigantan rondon, piroteknikaj fajraĵoj sur la bordo ŝprucas al firmamento, turniĝas, fajfas, bombas, disŝutas steletojn de ĉiuj koloroj sur la akvon kaj orkestro sur strando muzikas. Pli ol du horojn daŭras tiu danco de lumoj, poste la boatoj albordiĝas kaj sekvas dancado sur la bordo. Kaj ni finu per adiaŭa maska balo en restoracio Zátíši, la lastan vendredon. La muziko ludis, maskitaj gesamideanoj svarmis, la bona humoro de tiu ĉi entrepreno estas jam tradicia; ankaŭ la sento de venanta nostaĵo.

Apartan alineon meritas koncerto de voĉa, orgena kaj korda muziko, aranĝita de dro Fr. Vaněk la 28-an de Julio en katolika preĝejo je la 20,30 horo kun sekva programo: Bortnanskij: Kol Slaven, korda kvarteto. Bach: Preludium, koncerta gitaro solo. Je rememoro de Georgo Dimitrov, la grava slavo kaj amiko de Esperanto. — 1. Haendel: Largo; Giordano: Caro mio Ben - aldo, akompanata per orgeno kaj violono. 2. Haydn: Adagio; Mozart: Ave verum - korda kvarteto. 3. Dvořák: Bibliaj kantoj - aldo, akompanata per orgeno kaj violono. 4. Tarriga: La grimo - gitaro solo. 5. Brahms: Lulkanto; Fibich: Poem - aldo, akompanata per orgeno kaj violono. 6. Schubert: Adagio; Beethoven: Largo - korda kvarteto. 7. Gounod: Ave Maria - aldo, akompanata per orgeno kaj violono. 8. Orgena fugo. — Kantis kaj muzikis anoj de la Esperanto-Asocio Věra Borská, operkantistino, aldo, Brno; profesoro Štěpán Urban, koncerta gitaro, Praha; Miroslav Tyrála, I. violono, Ostrava; Ant. Sattek, II. violono, Příbor; Ladislav Kavka, alto, Bakov; Dr Frant. Vaněk, violoncello, Karlovy Vary. Orgenon ludis Lad. Kavka.

Duaj Floraj ludoj de SKED havis laŭ sciigo de direktoro Dro Pitlik dum la koncerto la 26-an jenan rezulton: En la konkurso partoprenis 4 personoj per 12 verkoj, el kiuj estis 11 versaĵoj kaj 1 prozaĵo. La komisiono decidis, ke la unuan premion ricevu K. Pič pro la poemoj „Kiel vi forveturas?“, „Mi vin amas, Georgino“, „Rendevuo“, „Princino Laŭro“, duan premion M. Kleinbauerová pro poemo „Mia urbo“ kaj trian premion Frant. Přecechtěl pro poemo „Porpaca preĝo“. Kelkaj el la premiitaj poemoj estis deklamitaj dum la vespero de M. Nývlt kaj aperis en VVD.

Verda Voĉo de Doksy, redaktata de Ant. Slanina, ree aperadis ĉiutage kaj estis legata de ĉiuj kursanoj tre atente. Ĝi estas instrua kaj amuza samtempe. Ni legis plurajn bonajn spritaĵojn sur tiuj ĉiutagaj kvar ciklostilitaj paĝoj, ni legis sur ili ankaŭ sincerajn kaj impetajn alvokojn por senti sin homarano. Ni enskribu tie ĉi vortojn de S. K. Neuman, cititajn de dro Vaněk: „Esti homo, tio sonas fiere!“ Tiujara „dusemajnkolekto“ fieras per ilustraĵoj. Ĉiu el la dek numeroj havas karikaturon de unu el la instruantoj fare de s-o prof. Fiala. La bildoj fariĝis tre popularaj, oni povis facile kompari ilin kun la originaloj kaj multaj trovis, ke la bildoj superas la vivulojn.

La humoro de la kursanaro estis eminenta kiel ĉiujare. Oni sin satis kaj amis reciproke, kursanoj la instruantojn, instruantoj la kursanojn. Kaj ĉiuj promesadis adiaŭante je revido ripepe.

Somera Esperanto-kursaro en Rožnov p. R. la 1.—15-an de Aŭgusto kunvenigis 61 partoprenintojn (24 el Bohemio, 34 el Moravio, 3 el Slovakio). La komenculan kurson (19

p.) gvidis s-o Vl. Slaný el Ostrava, la progresintan (21 p.) s-o Fr. Blaha el Gottwaldov, la superan (21 p.) s-o Ant. Satttek el Příbor. Sur ĉefplaco de la urbo kaj sur sokolĵejo, kie estis amasloĝejo de partoprenantoj, flirtis esp. flagoj. La kursanoj sekvis konsciencie la lecionojn, al kiuj la instruistoj dediĉis plej atentan laboron. La rezulton oni povis plej bone rimarki ĉe la komencantoj, kiuj post la du semajnoj povis aktive partopreni en simpla konversacio. Ĉiuvespere oni aranĝis amuzkunvenon, en kiu la ĉeestantoj ellernis ne unu novan Esperanto-kanton kaj malnovaj samideanoj rakontis travivaĵojn el kongresoj kaj el siaj kontaktoj kun eksterlandaj samideanoj. Ankaŭ ĉiu ekskurso, aranĝita en montaron Beskydy, sukcesis; belega naturo kaj favora vetero ebligis efektivan refreŝiĝon. Adiaŭa vespereto en bela halo de la Societa Domo estis altnivela. La kursanoj preparis valoran programon; la artisto el Brno komponisto prof. V. Scheiber kaj koncertkantistino Mančalová-Kalousová havas la plej grandan meriton pri tiu sukceso. Tre valora estis prelego de la progresema pastro de Ĉeĥoslovaka Eklezio Hoffner el Brno pri rilato de Esperanto al socialismo. Gesamideanoj el Ostrava, sur kies ŝultroj pezis la plej granda parto de la organiza laboro, Skařupová, Klegová, Šrámek, Slaný kaj aliaj povas esti fieraj pro tiu ĉi entrepreno tre utila. Ili estu salutitaj tre sincere. (Valeš)

En stacidomaj disaŭdigoj estis aŭdata Esperanto dum tiu ĉi somero ne unufoje. Kiam alvenis aŭ foriradis fremdaj gastoj aŭ kiam vojaĝis esperantista karavano la staciestroj kompleze permesadis al gvidanto, ke li esperantlingve salutis aŭ adiaŭu la gastojn, aŭ ke li voku siajn disponigojn kaj konsilojn al la karavano. Ni havas pri tiu ĉi saĝa komplezemo de staciestroj konfirmojn el Karlovy Vary kaj el Hradec Králové (aparta vagonaro al Liberec), sed ĝi okazis ankaŭ aliloke plurfoje. La progresemaj staciestroj akceptu pro tio nian dankon.

Vizito de gesinjoroj Rossetti. Nia Asocio invitis gesinjoron Rossetti el la urbo Troon en Skotlando, ke ili okaze de sia vojaĝo al Hungario vizitu ankaŭ nian landon. Ili volonte sekvis la inviton kaj pasigis ĉe ni unu semajnon, vizitinte la klubojn en Cheb, Karlovy Vary, Praha, Brno kaj Bratislava. Profesoro Rossetti, bone konata al la legantoj de Literatura Mondo kiel aŭtoro de spritaj noveloj kaj poemoj, parolis al niaj samideanoj pri aktualaĵoj en Esperanta literaturo. Ĉiuj, kiuj havis okazon aŭskulti la belsonan kaj riĉan lingvaĵon de la elokventa oratoro, neniam forgesos la intiman horon de agrabla, vere samideana kunesto. Niaj gastoj admiris la pitoreskan banlokon Karlovy Vary, gustuminte ĉiun el ĝiaj famaj fontoj, plus nian metropolon, la kastelon Karlštejn, la urbon Brno, kie ravis ilin la belaĵoj de la subtera mondo de Moravia Karsto, kaj metropolon slovakon Bratislava. La 10-an de Julio ili adiaŭis, pluvojaĝante al Budapeŝt kaj poste tra Svisio al la Universala Kongreso en Bournemouth. En Praha la 6-an de Julio estis prelego de Reto Rossetti en granda salono de Slovanský ostrov, vizitita grandnombre. Li pledis por efektiviĝo de la decido el Malmö, ke la kongresoj prezentu ankaŭ artisman programon kulture. Ekzemplo de tia artisma aranĝo estas internacia muzika kaj kantista konkurenco „Eistedfodd“ en Llangollen (en Kimrujo). La ĉefia infanĥoro de B. Kulinský partopreninta tie laŭ iniciato de ĝen. sekretario J. Mařík, rikoltis sensacian sukceson pro esperantlingva kantado. Rossetti recitis ankaŭ partojn el Bapto de Sankta Vladimiro en traduko de Pump, kiun li tre laŭdis.

Nederlanda-belga karavano, 52 esperantistoj, inter ili 42 nederlandanoj, 9 belgoj, 1 franco, vizitis aŭtobuse Ĉeĥoslovakion la 30-an de Julio ĝis 9-an de Aŭgusto, gviditaj de s-ino J. M. C. Hellinx, instruistino de kantado el Hilversum. La 30-an de Julio ili estis akceptitaj de s-o J. Vitek, komisiita por ilia gvidado de la Informministerio (dekreto el 20. VII. 49 nro 110417/49), en Rozvadov u Přimdy. Sekvis akcepto de la Klubo en Karlovy Vary, trarigardo de la urbo, koncerto, la 1-an de Aŭgusto veturo al Lány, vizito de tombo de Masaryk, vizito de Kladno, ekskurso al Karlštejn, vesperon alveno en Praha kaj sur Malnovurba placo meto de florkrono ĉe la tombo de Nekonata Soldato. Sekvontan tagon trarigardo de la ĉefurbo, veturo per aŭtoĉaro tra la urbo, vespere solena kunveno en la Klubo. La 3-an en Jičín komuna tagmanĝo en hotelo Stalingrad, ekskurso al Prafov-rokaro, veturo al

Hradec Králové, trarigardo de vidindaĵoj, komuna vespermanĝo. Sekvantan tagon veturo al abismo Macořa, vizito de Moravia karsto, alveno al Brno. Tie amika kunveno de la Klubo, tre bone vizitita, postan tagon trarigardo de la urbo, tra la urbodomo gvidis la gastojn la urbestro persone. Vespere la 5-an alveno al Třebíč, sekvantan antaŭtagmezon trarigardo de la urbo, komuna tagmanĝo, forveturo trans Třebíč kaj Jindřichův Hradec al Tábor. La 7-an post la matena ripozo trarigardo de la urbo, vespere kunveno de sudbohemiaj esperantistoj. La 8-an alveno al Plzeň, post la dek-dua horo komuna tagmanĝo, trarigardo de la urbo (bierfabrikoj kaj Škoda-uzinoj), vespere adiaŭa kunveno. Post tranoktiĝo en Plzeň la 9-an matene forveturo al Přimda-Rozvadov. La gastoj estis tre kontentaj. Estis ligitaj multaj amikaj rilatoj personaj. La gvidinto de la karavano s-o Vitek kun siaj helpantoj Rudolf Kolář el Karlovy Vary kaj Lída Kodydková el Jičín dankas al ĉiuj kluboj kaj iliaj membroj, kiuj tiom helpis en gastigado de la karavano, relative tre granda. Kaj ni tre ĝojas, ke amikoj el Nederlando kaj Belgio restis niaj amikoj kaj estis kontentaj. Estu salutitaj de ni ĉiuj!

Por via sano, samideano, utile servas Karlovy Vary (Carlsbad, Czechoslovakia) estas titolopaĝo de sespaĝa prospekto pri la fama mondbanloko, eldonita en tre bona esperantlingva traduko de Centra Propaganda kaj Informa Ofico de Karlovy Vary. La teksto kaj la traduko (de MUDr Fr. Vaněk) estas eminentaj. La prospekto estas ricevebla de ÚPIK en Stará louka č. 4, Karlovy Vary, kaj ni tre rekomendas al niaj legantoj peti ĝin por sendi al siaj korespondantoj.

Prospekto pri Bratislava, tre bele ilustrita, estis eldonita esperantlingve de Slovakotur, oficejo por vojaĝtrafiko en Bratislava, okaze de tria slovak Esperanto-kongreso. Oni povas ĝin ricevi senpage laŭ la donita adreso. La teksto kaj la traduklingvaĵo meritas egalan laŭdon.

Martin Benka, eminenta slovak artpentristo (nask. 1888) kiu esperantistiĝis antaŭ nemultaj jaroj, vokas en „Esperantisto slovak“ (4/5) artpentristojn de diversaj nacioj, ke ili aperu publike kiel anoj de nia movado. „Estiĝinte samideano, mi povas konstati, ke Esperanto estas por la internacia arto necesa helpilo, ebliganta venki ĉiujn malhelpaĵojn survoje al la komuna celo. Arto kaj scienco servas al tuthomara kulturo kaj interkompreniĝo. Esperanto aliĝas al ili tre konvene. Por mia pentra fako kaj por mi mem ĝi fariĝis bona helpilo kaj internacia amiko. Mi povas nur rekomendi Esperanton al ĉiuj kolegoj, kiuj ankoraŭ ne scias pri ĝi, ĉar per ĝi ili fariĝos veraj internacianoj.“ Majstro Benka estu salutita pro tiuj vortoj!

Slovaklingva semajna ilustrita revuo „Nedel'a“ (t. e. dimanĉo) regule enhavas duonpaĝan esperantan rubrikon „Samideano“. Krom la slovaklingvaj informoj pri esperantaj okazintaĵoj, la rubriko alportas ankaŭ esperantajn artikolojn, adresojn por korespondado ktp. Eldonantoj de la esp. gazetoj estas petataj sendadi interŝanĝe siajn eldonaĵojn por la revuo „Nedel'a“. Adreso: „Nedel'a, c/o Ján Lamačka, Trenčín, Pod Sokolicami 1675, Ĉeĥoslovakio.

Junulara Fako Asocia tre viglas nun. Aperigis kvar ĉeĥlingvajn flugfoliojn tre impetajn pro ŝparado per vortoj. Atentigu pri tiu fakto ĝojinda gejunulojn!

Urbo sub signo de l'fajro aperos, laŭ informo de Distrikta Kleriga Konsilantaro en Kladno, iom pli malfrue ol oni intencis. Post apero ĝi estos sendita al ĉiuj mendintoj. Tial ne reklamaciuj ĝin!

Esperantologio

Internacia revuo por la lingvistiko kaj bibliografio en Esperanto. — Unua volumo 80-paĝa aperis kaj ricevos ĝin ĉiuj interesuloj, kiuj pagis la abonon de 250 Kčs. — Ni akceptos ankoraŭ kelkajn abonojn.

LINGVO

Překlad úkolu 23.

La ŝtalon oni mezuras per metro. Si observis lin malŝate (malrespekte). Li ekvidis altstaturan viron, kiu celis rekte al li. Li estis altstatura, li havis mezuron de preskaŭ du metroj. La terpeco havis mezuron de du hektaroj.

Horo post horo pasis (estis pasanta), pasis multe da ili. Se amo pasos, nenion plu la kor' ellasos. Lia kolero pasis. Li preterpasis nin ne respondante nian saluton. Ni pasis preter maljuna branĉorika tilio. La tuta agado maltrafis la ĝustan efikon, rezulton. De sur la deklivoj la neĝo estis malaperanta (perdiĝanta). Mi konfesas, ke tiun ĉi lokon mi intence evitadis.

Sveniga odoro de robinioj, Trompa imago. La sensoj lin trompis. La tentado de satano.

Lia fiksa rigardo konfuzis. Ne lasu vin erarigi (= uvesti v omyl) per tiaj paroloj (ne lasu vin konfuzi = uvesti ve zmatek) per tiaj paroloj. „Ligi“ kaj „bindi“ estas intermiksata de iuj. Ne erarigu min (= neuváděj mne v omyl) dum la kalkulado.

Malsupreniru! Post nelonge ni devojiĝis kaj eniris arbaron. Falis ja iom da neĝo, sed ĝi baldaŭ malaperis. Li pereis per terura morto. Mi ekmiris, kiel rapide tiu homo kadukiĝis (= zchátral), malgrasiĝis (= zhubeněl). La kunveno ne okazis pro nesufiĉa partopreno. Venont(foj)e ni kunvenos ĝustatempe.

Persontrajno (persona vagonaro) kunpuŝiĝis (koliziis) kun vartrajno. En somero lakto ofte kazeiĝas. En vintro vaporo kondensiĝas sur fenestroj. Pro lavado la ŝtofo kuntiriĝis. La solvaĵon ni precipitos per hidrogensulfido.

Poznámky:

1. Rekte al li = ĉirkaŭ k němu. Direkte al li = en la direkto al li = směrem k němu. 2. Mezuri dle P. V. znamená: prováděti měření. Měřiti, t. j. míti míru = havi mezuron de, da.

RICEVITAJ LIBROJ

Lerneja Reformo en Ĉeĥoslovakio. Tradukis Jaroslav Mařík. Kunlaboris Dro T. Pumpr. Eldonis Instituto de Esperanto-Servo en Praha. Kontrolis A. Malík, prezidanto de la Instituto. Presejo Orbis, Praha. Biblioteko Vol. 2. 60 paĝoj 11×15 cm. Senpage sendata al fremdlando. — La libreto enhavas Diskurson de lerneja ministro Nejedlý en la ĉeĥoslovaka parlamento, per kiu li la 21. IV. 1948 prezentis la lernejan leĝon al ĝi, kompletan tekston de la leĝo, komenton pri tiu leĝo de Jaroslav Paur kaj noton pri kvar ĉs. pedagogoj (Lindner, Drtina, Otakar Kádner, Bohuslav Kádner). La traduko, kiu estis almenaŭ same malfacila kiel tiu de la Konstitucio, estas tre bona, la aŭtoroj akceptu sinceran gratulon. La „Komentario“ de Paur estas tre instrua por ĉiu leganto, precipe pri samtempa vidmaniero de lerneja administro en nia lando. Li informas klare per simpla stilo kaj evidente li estras la materialon. Same la diskurso de ministro Nejedlý. Fremda leganto certe trovos multon por primediti. Ankaŭ tabelojn pri instruobjektoj kaj pri horoj al ili dediĉitaj en diversaj lernejoj mi trovas tre utilaj en tiu ĉi verko. La preso kaj papero de la broŝuro estas tre bonaj kaj certe la agraba eksteraj logos de ricevintojn al legado. Nepe dissendu la libreton. Ĝi estas verko tre grava kaj valora, vi certe ĝojigos viajn amikojn!

Rudolf Hromada: Slovník česko-esperantský. Vydal Svaz esperantistů v ČSR, 1949. Tiskl Čil, Karl. Vary. 188 paĝoj 12×16 cm. Prezo 45 Kčs. — Tiu ĉi nova vortaro ĉeĥa-esperanta estas efektive nova. Depost verko de la vortaro Kühnl-Procházka aperis pluraj ĉeĥaj-esperantaj

Překlad tohoto úkolu zaslali: Jiří Bartoš, Lomnice n. Pop.; Alfred Macek, Pulgary; Josef Odehnal, Gottwaldov; Frant. Pospíšil, Olomouc; V. Růžička, Podmokly; Ant. Schoblová, Beroun; Ing. Em. Tuháček, Krnov; MUDr. Frant. Vaněk, Nová Role; Karel Vít, Gottwaldov; Marie Vítavská, Hranice. Celkem deset čtenářů. Odměnu za dobrý překlad dostává p. V. Růžička.

Úkol 24.

Cvičení v rozeznávání významových odstínů českých slov, zejména sloves, pokládáme za velmi důležité. Proto předkládáme další skupinu sloves. Před překládáním nahleďte do slovníčku Hromadova.

Odepsati. Odepiš ihned, co míníš učiniti. A tak to tedy odepíšeme od dluhu, že ano? Sotva pohlédl do spořitelni knížky, poznal, že jsou odepsány nějaké peníze. Náš inventář je odepsán na korunu.

Míniti. To jistě udělal ten náš kluk, mínila babička. A co míníte dělat? Míním se vrátit za týden.

Těšiti. Těší mne (= těším se), že Vás vidím zdravého. Těším se z jeho úspěchu. Musil jsem ho, ubožáka, těšiti.

Složiti. Seděl se složenýma rukama. Složená slova. Zboží bylo složeno s nákladního auta za hodinu. Auto bylo složeno za hodinu. Ze zdravotních důvodů složil svou funkci. Kdo složil Prodanou nevěstu? Musí složiti záruku. Složil přísahu, že bude mluvit pravdu.

Přičísti. K výsledku připočteme sto. Za obsluhu se připočítává 10 procent. Přičítají to neštěstí, náhodě. Neřičítejte ten neúspěch mně.

Opatřiti. Musím si tu knihu také opatřit. Jak si chcete opatřit potřebné peníze? Na dlouhou cestu jsme se opatřili prádlem. Armáda byla dobře opatřena. Slibil, že to opatří. U nás v továrně jsou dělníci dobře opatřeni.

Věnujte těmto překladům aspoň část některé své klubovní schůze! - Překlady zašlete do 14 dnů od vyjití čísla.

vortaroj, kiuj indikas laŭ la nazisma teorio „arĵo“. Estas „proleto“ kaj „proletaro“, „nacia parlamento“, „komisiito“ (por povĉenenec), ne estis forgesita ekz. provĉerka k. t. p. Precipe rimarkindaj estas detalaj klarigoj pri signifo de ĉefaj prezpozicioj. Ekz. al „na“ estas dediĉitaj pli ol du kolonoj. Granda atento estas dediĉita al ĉefaj vortoj kun prefikso ne, kiujn oni ne ĉiam povas traduki kun esperanta „ne“. Generale la aŭtoro tre atentis pri indiko de diversaj signifoj de la vortoj, ankaŭ pri ŝanĝo de ilia signifo en vortkunmetoj kaj vortsekvoj. Tre utilis ankaŭ la fakto, ke la vortaro aperadis kiel aldono al nia gazeto. Oni povis uzi diversajn kritikojn kaj sugestojn de la legantoj por la libroeldono. Ni ĝojas, ke verko tiom bona povis esti eldonita de nia Asocio.

Daniel Quarello: Komplementoj de l'substantivo. (Prepozicio. Komplementoj de l'substantivo. Atributo de la substantivo. Substantivaj komplementoj. Komplementoj de l'verbo. Libera akuzativo.) Quarello & cia, eldonistoj, Buenos Aires. — Dua kajero, paĝoj 33—64 (15×20 cm) el la verko „Lernu Esperanton“, pri kies unua kajero ni raportis sur p. 8 de nia tria jarkolekto. Ni ripetu tie ĉi laŭdon pri klareco de difinoj kaj pri simpleco de ekzemploj. La supra citaĵo de la titoloj de ĉapitroj informas pri enhavo de tiu ĉi kajero. Sed la leganto ne forgesu, ke kelkaj asertoj estas persontaj opinioj de la aŭtoro. Ĝi kostas 15 Kčs kaj estas ricevebla de nia Librovendejo.

Somera universitato. Malmö 1948. Eldonita por Universala Esperanto-Asocio de The Esperanto Publishing Company LTD, Rickmansworth, Herts., Anglujo. 1949. 108 paĝoj 15×19 cm. Prezo 4 ŝil., afranko 2 p. — La bele presita libro enhavas tekstojn de ĉiuj naŭ prelegoj dum la Malmökongreso: La laponoj kiel kultura popolo (B. Colinder), La kimraj artofestoj (R. Rossetti), El la mirinda naturo (Stop Bowitz), Astronomiaj sensacioj (K. Lundmårk), Ĉefprincipoj de la nuntempa internacia juro (Ivo Lapenna), El la fronto kontraŭ malamikoj de la kulturplantoj (P. Neergaard), La kalevala kulturo (Vilho Setälä), Pri la sveda koopera movado (S. A. Stahre), Du svedaj humoristoj kaj unu hungaro (F. Szilagyí). Inter la naŭ prelegintoj estis anglo, norvego, finno, kroato, dano, hungaro kaj 3 svedoj, do grupo sufiĉe internacia. La prelegoj estis popularaj, sed la aŭtoroj ĉiuj vidigas efektivan fakulecon kaj tralegis la libreton estas ĝuo por ĉiu ŝatanto de homa scio. La temoj estas tre diversfakaj, sed ĝuste tio donas ĉarmon al legado. Oni estas iam eĉ surprizita pri la tre bona lingvaĵo, per kiu estas donataj tiuj diverstemaj lecionoj. Pro tio meritas dankon versimile ankaŭ la direktoro de la „Somera universitato“ rektoro Karl Söderberg. Mi tralegis kun intereso, ofte kun streĉita atento, ĉiujn tiujn prelegojn. Ĉiu instruis al mi ion novan. Pleje impresis min tiu pri la sveda kooperado; ĝia aŭtoro efektive estas unu el kreintoj de disvolvo de la koopera movado en sia lando. Estis por mi edifanta sperto legi tiun raporton de viro, kiu evitante ĉiun ajn fanfaronadon fiere rakontas pri rezultoj imponaj. — Tiu ĉi libro estos citata dum multaj jaroj.

Pisemný kurs mezinárodní světové řeči „Esperanto“. Řídí Klub esperantistů v Hradci Králové. 62 paĝoj, 16×22 cm. — Esperantista Klubo en Hradec Králové organizas skriban kurson. Por tiu celo ĝi presigis lecionojn de la kurso, sume 12, en kiuj estas donitaj krom la gramatiko ankaŭ elementaj faktoj el historio kaj organizo de la movado. La skriba kurso havas sukceson, kiel estas konstateble el daŭra kresko de membroj de la Klubo. Tio estas ĉe tiu ĉi eldono laŭdinda precipe.

Voĉoj de poetoj el la Spirita Mondo. Eld. de Livraria Editora da Federação E. Brasileira, Rio de Janeiro, 1944, 144 paĝoj.

Mi enpenis ĝis pri nova sperto, kiun mi faris veturante vagonare kamparen.

Sur miaj genuoj kuŝas ĵus distranĉita volumo de poemoj. Sur ĝia kovrilo verdas iom kurioza titolo: „Voĉoj de poetoj el la Spirita Mondo“. Estas plaĉa kolekto de poemoj, kiuj verdire estas mesaĝoj de spiritoj, komunikitaj pere de mediumoj, inter kiuj la ĉefa estas Francisco Cândido Xavier (savjer), tre juna kaj neklera, modesta vilaĝano en Brazilo.

Jam unu jaron kuŝis ĉi tiu poemvolumo en mia ŝranko inter aliaj nelegitaj libroj. Ĝi atingis min el Brazilo. Nur

hodiaŭ, lasinte la grandurbon malantaŭ mi, dum vagonarveturo... Mi eksentis kvazaŭ esti trovinta trezoron; tutan jaron ĝi kuŝis enfosita en mia loĝejo. Kaj en tiu momento mi envis al niaj eksterprahaj samideanoj. Mi ekkonis, ke la tumulto vivo en la grandurbo tiom nin absorbas, ke mankas tempo kaj ankaŭ emo fordoni sin al subtila legaĵo.

Nova sperto por mi.

Miaj okuloj denove glitas sur la paĝoj. En ĉi tiu libro verse parolas al ni forpasintaj korifeoj de la Esperanta poezio. Oni revidas la karajn nomojn de Grabowski, de L. L. Zamenhof, Schulhof, de brazila versfaranto ĉeĥdevena T. A. Dolejš kaj de aliaj. Oni pensu ion ajn pri fidindeco de la aserto, ke la teksto estis diktata al mediumo rekte de poetoj el la Spirita Mondo. Sespaĝa antaŭklarigo de I. G. Braga konatigas nin kun la spiritismo kaj la rolo de mediumoj, citante ankaŭ la difinojn de ambaŭ nocioj en la „Filozofia Vortaro“ de D-ro Stan, Kamaryt. Ĉiukaze mi trovis la libron tre altira kaj mi ne ĉesis antaŭ ol hejme finlegi la lastan paĝon, je la unua matene. Kaj mi sentis strangan emociion, legante edifan mesaĝon de L. L. Zamenhof „Al la Esperantistaro“, komunikitan al la mediumo 7/8 1943, en la tempo tiom plaga por la homaro kaj por lia adeptaro... „Ne dubu, amata animo, pri l'fakto, ke mi efektive al vi nun parolas,“ vokas al ni Zamenhof 3/9 1943. — Ĉu efektive ekzistas ligiloj inter la korpmortintoj kaj la korpvivantoj?

Ni redonu ĉi tie almenaŭ unu kompletan versaĵon, kiu estas parafrazo de poemo tiom bone al ni konata:

HO MIA KOR'

Ho mia kor', nun batu jam trankvile,
jam proksimiĝas la feliĉa hor',
en kiu povos spiri mi facile,
ho mia kor'!

Ne mortis ĉiuj ĝerموj de l'semado,
aperas jam la fruktoj de l'labor';
sufiĉas! trankviliĝu en batado,
ho mia kor'!

Revenas en la mondon nova sento,
de l'malliber' la birdoj flugas for;
ekĝoju pro la grava do evento,
ho mia kor'!

J. Mařík.

Raporto pri la kongreso en Liberec aperos tuj, kiam ni ricevos permeson por papero, kaj ricevos ĝin ĉiuj membroj.

ESPERANTISTA VIVO

Pri F. VI. Lorenz ni legas en Rio Esperantista (Nov.-Dec. 48): „Francisko Valdomiro Lorenz fartas tre bone, sentas sin juna kaj edziĝis denove la 8-an de Novembro 1948. De kelkaj jaroj li estis vidvo kaj ekamis denove, fianĉiĝis kaj fine edziĝis kaj komencis duan mieltempon la 8-an de Novembro 1948. Lia dua edzino estas nomata Franciska kaj la gefranciskoj vivas feliĉaj en Dom Feliciano Rio Grande do Sul, Brazilo. Pri lia preciza aĝo ni ne scias, sed li tute ne maljuniĝis nun.“ Nia redakcio kaj nia komitato salutas la samnacionon kortuŝitaj kaj gajaj.

MUDr L'udovít Izák, redaktoro de Esperantisto Slovaĉka en Turĉ. Sv. Martin, ĝisvivas la 9-an de Oktobro sian kvindekajn jaron. Nia kunbatalanto estu salutita laŭte kaj gaje, ni ne supozis, ke junula viro, kiun ni konas dum nemultaj jaroj, jam renkontis Abrahamon. Sed asertas tion homoj fidindaj. Despli sincera estas nia deziro: Multajn jarojn!

Mortis nia membro Josef Veselý, posedanto de restoracio en Praha, la 7-an de Julio. Lia edzino kaj ceteraj familianoj akceptu esprimon de nia plej sincera kondolenco.

Edziĝo. Tibor Simon kaj Věra Nováková la 9. VII. en Chotějovice.

Edziĝo. Milan Brunclík, faka instruisto en Liberec, kaj Mlada Stupková en Praha, en Julio.

La junaj paroj akceptu sincerajn bondezirojn!

SCIIGOJ

Akademio de Esperanto. La prezidanto Ir. J. R. G. Isbrucker per cirkulero n-ro 26 el Julio sciigas rezulton de elektoj. Estis plenigitaj 21 vakantaj lokoj el 54 kandidatoj. La voĉdoniloj estis dissenditaj en Marto al 47 membroj. Ĝis la 14-a de Julio estis ricevitaj 40 plenigitaj voĉdoniloj, kaj estis elektitaj tiuj kandidatoj, kiuj ricevis 16 aŭ pli voĉojn. Plej multajn ricevis Setälä (37), po 16 ricevis Avril, Downes, Solzbacher. El ĉeĥoj estis reelektitaj Hromada (26) kaj Dr Pitlík (22). Novaj anoj de la Akademio farigis Bennemann, Stop-Bowitz, Bünemann, Avril, Downes, Solzbacher. Mi pensas, ke nun devus demeti funkciojn ĉiuj akademianoj neelektitaj dum tiu ĉi balotado kaj subigi sin kun ĉiuj kandidatoj ne elektitaj al nova balotado. Estas hazardo, ke ni ne mortis dum la ses-sep milijaroj. La novaj akademianoj certe estas tre kompetentaj. Tamen ankaŭ en nuna tempo ankoraŭ ili devas esti kaj resti aktivaj ankaŭ en organiza laboro. Tiu neoblo dividi la laboron estas certe tre bedaŭrinda. (Kamarýt)

En Slovakujo estis fondita „Esperanta informa servo“ (EIS) kun celo peradi informojn kaj sciigojn pri okazintaĵoj en Esperanto-movado tutmonda kaj zorgi pri ilia enpresado en slovakaj gazetoj. La samideanoj, precipe kiuj estas pretaj al kunlaboro kaj sendos al ni taŭgajn informojn, ricevos interŝanĝe nian informilon. Ĝi enhavos sciigojn pri esperantaj, sociaj, kulturaj kaj similaj okazintaĵoj nialandaj. Same ni danke akceptos informojn ĉiuspecajn, ne nur esperantistajn. Adreso: Esperanta informa servo, Trenčín, Pod Sokolicami 1675, Ĉeĥoslovakio.

Ni rekomendas al niaj membroj aboni „Esperantiston Slovakian“, gazeton tre zorge redaktatan. Jarabono Kčs 70.—. En Turĉ. Sv. Martín, Kuzmányho 29.

„Verda stacio“ plilongigis tempon de siaj elsendoj.

Ekde la 5-a de Oktobro 1949 komencos „Verda stacio“ regule elsendi ĉiam la unuan merkredon de la monato 45-minutan artan programon sur ondoj: Praha II 269 m, Morava (Brno) 325 m, Ostrava 259 m, České Budějovice 219 m, je la 23-a horo 15 minutoj.

Karaj gesamideanoj! Ni scias pri viaj plendoj pro malfrua horo de nia elsendado. Sed ni petas, pripensu serioze la aferon. „Verda stacio“ estas la unusola esperantista stacio kun longaj kaj artaj programoj. Ĝi elsendas unufoje en la monato; ĉu ĝi ne meritas vian oferon de unu duonokto monate? Vi certe ne ĉiutage iras dormi tuj vespere. Do, ŝparu vian tempon por „Verda stacio“! Ni klopodos pri interesa programo por rekompenci vin.

Dum la lasta tempo ni ricevis de vi malmultajn korespondadojn. Ni senkulpiĝas vin, ni scias, ke vi libertempis. Sed nun ni insiste petas: Skribu al ni, kunlaboru kun ni! Subtenu nian poresperantan laboron! „Verda stacio“ estas via, pure esperantista, nur kun arta kaj kultura programo.

Atentu! La 5-an de Oktobro ni elsendos duan fojon operon „En la puto“ de Vilém Blodek en esperanta traduko de dro Tomáš Pumpr kaj dro Josef Fousek. La unua ĝia elsendo vekis grandan eĥon ne nur ĉe esperantistoj, sed ankaŭ ĉe neesperantistoj. Skribis al ni multaj aŭskultintoj ankaŭ en sia nacia lingvo (mirinde, komprenante sufiĉe Esperanton). Unu angla samideano skribis: „La opero estis anoncita ankaŭ angle. Kvankam ĝi estas mia gepatra lingvo, mi komprenis pli bone la esperantan anoncon.“ — Ni petas, aŭskultu kaj multnombre skribu! Atentigu pri tiu ĉi grava elsendo viajn amikojn!

Verŝajne ni eldonos ciklostilan gazeton, kiun ricevos niaj aŭskultantoj. Ne postulu individuan respondon! De tempo al tempo ni respondos al vi en niaj horetoj kun aŭskultantoj. — Viajn leterojn kaj poŝtkartojn adresu: „Verda stacio“, Praha XII, Stalinova 12.

Antonín Slanina, esper. gvidanto de „Verda stacio“.

ĈESKÉ LISTY O ESPERANTU

Esperanto je poŝtkem mezi národy. Mezinárodní jazyk esperanto se stal skutečným poŝtkem národů z nejrůznějších částí světa. V minulých dnech obrátila se v pravidelné rozhlasové relaci k esperantistům s prosbou o pomoc členka jednoho brněnského esperantského kroužku, která potřebovala nevyhnutelně lék Ratin pro těžce nemocného manžela. Léč není nyní u nás k dostání. Již za 24 hodiny došla z Kodaně od P. Thorsena zásilka léku s tímto dopisem: „Tento lék je u nás snadno k dostání. Posílám jej, ačkoliv je dosti drahý, jako dík za srdečné a bratrské přijetí, které připravili mně a mojí ženě loňského roku samideání a samideánky v Československu a za skutečně hodnotná vysílání čs. rozhlasu, který nás v esperantu informuje o vaší krásné zemi, jež je již na cestě k socialismu.“ (Zemědělské noviny, Praha 3. 4. 1949.)

Každodenní esperantská vysílání bulharského rozhlasu. Po válce mnoho evropských i zámořských rozhlasových stanic zavedlo pravidelné vysílání v mezinárodní řeči esperanto. Některé stanice zařadily každodenně jednu i více esperantských relací. Po československém a francouzském rozhlasu přichází i bulharský rozhlas s pravidelným denním vysíláním v esperantu. Sofia vysílá o 20. hod. normálního středoevropského času denně 15minutové relace v esperantu na vlně 39,11 m. Zprávy o jakosti poslechu, jakož i svá přání a podněty sdělte písemně na adresu: Radio Sofia, Sofia, Bulharsko. (Lidová obroda, Brno 3. 5. 1949.)

Slovenský týdeník „Nedel'a“ z 15. 5. 1949 přináší ilustrovanou reportáž o Holandsku, jež jest takto zakončena: „... Je to tiež krajina ľudi, zvedavých na život a pomery u nás. Škoda len, že tamojšie noviny nie vždy pravdivo informujú o nás svojich čitateľov. Majú preto výhodu tí, ktorí ovládajú medzinárodnú reč esperanto a môžu si vypočuť zprávy z „prvej ruky“; priamo z Československa v esperantskom vysielaní nášho rozhlasu. Že zahraniční esperantisti tú možnosť i využívajú, dokazuje napr. list od J. C. J. Hama z Rotterdamu W, Huygersstraat 17b, ktorý píše:

„... Pravidelne počúvam esperantské vysielanie stanice Praha a teším sa, možuc konštatovať, že pomery vo vašej krajine nie sú také, ako ich opisujú tunajšie časopisy. Z toho vyplýva, že vysielania v esperante sú veľmi cenné na informovania zahraničtá ... a robia veľmi veľkú službu vášmu štátu a vašim národom ...“

KORESPONDI DEZIRAS

Bořivoj Dubský, Radonice n. O. 102, p. Slavětín n. Ohří kun tuta mondo. Por 50—150 PM li sendas saman kvanton da ĉs. PM en kompl. serioj.

Membroj de Filatelista klubo „Sokol - ŝkodovy závody“ intŝ. PM kun ĉiuj landoj. Adreso: Emil Rozum, Bendova 32, Plzeň.

Kun gesamideanoj el tuta mondo, ankaŭ el ĈSR, s-ino F. Záleská, Hybešova 35, Brno kaj f-ino Z. Dobiášová, Tržní 14, Brno 18.

Mir. Lunga, Skoronice 110, p. Kyjov, Moravio, ĈSR kaj intŝ. PI kun ĝejnuloj el ĉiuj landoj.

Jaroslav Dudr, studento, Velkomeziříčská 43, Třebíč, pri filmo, teatro, sporto, libroj, vivo en ĉiuj landoj.

Jaroslav Lokr, Žamberk, 300, intŝ. PI.
Jaroslav Rybář, poŝtestro, Karlovy Vary-Dvory intŝ. PM kun tuta mondo.

E. Vrbanec, Křižaničeva 40, Varaždin (Jugoslavio) interŝ. nacilingvaj il. gazetojn, laŭeble kun tipografo.

F-ino Regina Bojanowska, 19-jara, studentino de Belaj-Artoj-Liceo, Starowiejska 25/3, Gdynia, Pollando.

M. B. Filkov, 18-jara studento, A. Kančev 12, Razgrad, Bulgario.

Ne plu deziras korespondi Albert de Nieuwe el Haarlem, kiu ricevis tro multe da korespondadoj el nia lando. Li dankas, sed bedaŭras, ke li ne povas ĉiujn respondi.

Infanoj el Uruguay ne deziras pliajn korespondanton el nia lando. Al nia lasta alvoko anoncis sin pli ol 100 legantoj de „Esperantista“.

Vychází měsíčně (10krát do roka). Majitel, vydavatel a nakladatel Svaz esperantistů ĈSR v Praze XIX/7, p. příhr. 7075. Odpovědný zá-
stupce listu Dr Stan. Kamarýt. Členům Svazu zdarma. Členský příspěvek 70 Kčs. Účet pošt. spoř. 9.602. Tiskne »CII« v Karl. Varech. Účet
na poštovní novinové službě povolena řed. pošt. v Praze č. j. IA-Gre-2372 OB-48. Dohledací poštovní úřad Praha 022.